



7(135)
2012

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Luljeta Lleshanaku

Shah

Ĝshtë vjeshtë. Venat ne mermer
bymeĥen nga shirat.

Varret e të afërmve të mi,
me veĥtem katër gisht kohë midis,
të vënë në radĥe
si një varg makinash të bllokuara
në kryqëzim me hekurudĥen,

Lufta ka marrë fund. Ajo dorezë farkĥtari
qĥ i mbante dikur, si gishtat, të gjithë bashkë
ĥshtë hedhur, e panevojshme, tej.

Jashtë saj, ata janë thjesht ca të panjohur
qĥ presin vetëm trenin të kalojë
në krahun tjetër të rrugës...

Aroma e dheut
të kujton shtëpinë
ku mungon një orë e varur në mur.

Un pastroj emrat me kujdes në pllaka.
Vitet – si plagë të vogla në gjunjë.
Dashurinë – qĥ tashmë djeg më pak
se një gjemb trëndafili.

Në të hyrë të varrezës
roja qĥ luan shah me veten në kabinë.

Ŝako

Aŭtuno. Vejnoj en marmoro
ŝvelintaj de pluvo.

La tomboj de miaj proksimuloj,
kiujn apartigas
kvar tempo-fingroj
kiel aŭtomobilojn en la vico
antaŭ la kruciĝo de la vojo kun reloj.

La forĝistan ganton,
kiel tutajn fingrojn kune,
oni jam ne bezonas. Finita la batalo.

Transe ili simple estas
aro da nekonatoj,
kiuj atendas la preterveturon de trajno...

La odoro de la tero
rememorigas al mi la hejmon,
en kiu mankis la horloĝo pendanta sur la muro.

Zorgeme mi poluras iliajn antaŭnomojn sur
platoj.
Jaroj – kiel gratvundetojn sur la genuo.
Amo – pikas nun pli delikate ol rozo-dorno.

En la budeto ĥe la pordego
la tombejgardisto ŝakludas kun si.

La renkonto kun granda albana literaturo

En 2012 j. Tomasz Chmielik tradukis esperanten la libron **Hunda haŭto** (Lëkura e qenit) de la nuntempa albana verkisto Fatos Kongoli, kaj per komunaj fortoj de sponsoroj, i.a. de la alzacano Edmond Ludvig kaj de la Podlaĥia Libraro, ĝi estis eldonita en Bjalistoko. Krom tre interesa enhavo la libro rekomendas sin per bela ekstera aspekto. Foton sur la kovrilpaĝo faris Anna Worowska, tipografie prilaboris ĝin Ewa Frymus-Dąbrowska.

Tiu ĉi evento naskis la ideon vojaĝi al Albanio kaj renkontiĝi kun la aŭtoro. Nia celo estis ne nur konatiĝi kun la lando, sed ankaŭ promocii Esperanton montrante, ke en diversaj landoj ĝi povas esti uzata dum internaciaj renkontiĝoj. 50-minuta televida intervjuo pri Esperanto farita kun la tradukanto de la libro Tomasz Chmielik, reprezentantino de Podlaĥia Libraro Elżbieta Karczewska kaj nia albana gvidanto kaj tradukanto esperanten Bardhyl Selimi estis spektebla en la tuta Albanio. Okazis ankaŭ renkontiĝo en la Akademio de Sciencoj kaj en la Ministerio pri Kulturo, Sporto kaj Junularo, prelego en la Tirana Universitato por studentoj de fremdlingvoj. Ĉiujn prelegojn simultane kaj precize tradukis esperanten aŭ albanen Bardhyl Selimi.

La plej grava momento de nia restado estis la renkontiĝo kun la aŭtoro de la libro. Modesta, ĉarma en interhomaj rilatoj, parolanta mallaŭte kaj ege kortuŝe, li multe impresis nin.

Albanio povas esti vere fiera pro posedo de tiom valora verkisto. De la debuto en la 1992 j. li publikigis kvin romanojn pro kiuj ricevis trifoje la "Arĝentan Plumon" (1995, 2000, 2002) kaj en 2004 la "Oran Plumon" por sia tuta verkaro. Post ili ankoraŭ aperis du romanoj **Hunda haŭto** kaj **Ĉe la pordego de Sankta Petro**. Romanojn de Fatos Kongoli oni tradukis en la lingvojn franca, germana, itala, greka, slovaka, pola kaj Esperanto.

Hunda haŭto estas historio pri la vivo de averaĝa intelektulo, kiu mem faras nenion, nur lasas al diversaj albanaj eventoj forkapti sin. Junaĝe li volis fariĝi poeto, sed plene malsukcesis. Finfine li komencis labori, kiel scenaristo en la ŝtata filmproduktejo. Tamen multajn filmojn laŭ liaj scenaroj oni rekonis kiel fuŝitajn pro la sentimentaleco. La hazarda sorto enpuŝas lin en la situaciojn, kies sekvon ne eblas antaŭvidi. Li estis tro malforta por memstare decidi pri la propra vivo. Fatos Kongoli desegnis interesan portreton de malinteresa homo kaj proponas majstre kaj lerte ŝpinatan aman kaj politikan intrigon.

La romano povas esti legata diversmaniere: kiel amromano, kiel amara disputo kun la propra pasinteco, kiel individua historio pri la malsukcesa vivo kaj multe da perditaj ŝancoj aŭ kiel plitika rakonto pri Albanio regata de komunisto-diktatoro.

Se kompari la romanojn de Ismail Kadare kaj Fatos Kongoli – plej eminentaj aŭtoroj de la moderna albana literaturo, oni povas vidi gravan diferencon. Pli proksima al leganto estas Kongoli, kiu en siaj verkoj prezentas sin malkaŝante ĉiujn sekretojn de la propra animo kaj ankaŭ tiujn verojn, pri kiuj en Albanio multaj volonte kaj prefere silentas. Lia kuraĝo estas admirinda kaj kreas modelon por tiuj, kiuj post la falo de komunismo faras la bilancon se sia vivo.

Aplaŭdon vekis la informo, ke danke al la universala lingvo **Hunda haŭto** atingis Pollandon, Luksemburgion, Usonon, kaj eĉ Madagaskaron. Tomasz havis okazon rakonti pri aliaj libroj de albanaj aŭtoroj tradukataj al Esperanto, i.a. pri tradukataj de li nune versaĵoj de juna poetino Luljeta Lleshanaku. Venontan tagon en multaj albanaj gazetoj aperis vastajn artikolojn pri la evento kun fotoj de aŭtoro kaj tradukanto. Multaj personoj havis okazon ricevi aŭtografajn de Fatos Kongoli kaj Tomasz Chmielik sur la rekomendata libro. Ĉi-cele Elżbieta alportis 50 ekzemplerojn de **Hunda haŭto** en Esperanto por Podlaĥia Libraro.

Okazis do nekutima kaj laŭ ni la plej bona varbado pere de grava serioza rekomendo lingva kaj kultura, kiu povas esti nekompareble pli sukcesa ol skui verdan standardon kaj rakonti senpruve, ke Esperanto estas lingvo absolute necesa por homaro. En tiu kazo oni montris konkretan valoran fakton, gravan por ĉiu homo, al kiu ne estas fremda lingvo kaj kulturo.

Arigita multnombre, studanta junularo favore kaj komprene akceptis nian mesaĝon. Tre plaĉis al ili Jolanta Kieres, kiu instruis amuze Esperanton uzante la rektan metodon. Bardhyl tuj kaptis okazon por skribi sur la tabulo la kontaktadresojn por venontaj kursanoj. Espereble nia alveno helpis al lokaj esperantistoj varbi por Esperanto junularon, kion ni al ili elkore deziras.

Fatos Kongoli

Hunda haŭto [fragmento]

Vidu, la gazetaro estas kampo kun minoj. Kaj mino povas esti kaŝita tie, kie vi eĉ ne imagas, en unu litero. Ĉu vi pensas, ke vi povus eksplodigi vian karieron pro unu litero? Kvankam tio ŝajnas neebla, mia amiko iam pereigis sin tiel, en la tempo, kiam ni trinkis rakion kun via patro, pro la fatala, stulta manko de atento. Ĉar anstataŭ la litero "L" estis la litero "K". Kaj anstataŭ la vorto LACEGO oni vidis la vorton KACEGO. Kaj sekvatage en gazeto aperis la titolo skribita majuskle: "Ŝvito kaj kacego estas ĝuo por la sovetia laborista klaso dum fervora penado". Iru kaj konvinku ĉiujn, ke estas nur fuŝo kaj ne saboto, kiel plej ofte la gvidantoj traktas similajn erarojn. Kaj se homo estas nur maldungita, li devus ĝoji, ke la tuta afero finiĝis nur tiel, sed povas okazi multe pli malbone. Fali pro litero – jen la klasika ekzemplo, ĉar ĝis la nuna tago la teknologio preskaŭ ne ŝanĝiĝis de la gutenberga tempo. Sed ekzistas amaso da kaptiloj, kiujn la gazetaro pretigas al la hodiaŭaj redaktoro kaj ĵurnalisto, inter la plej simplaj miskomprenoj kaj tre komplikaj ideologiaj eraroj. Mallonge dirite, tio estas aĉa laboro. Ĉiufoje, kiam aperis la nova numero, la sekvan tagon mi sidas antaŭtagmeze en mia kabineto, kun pika doloro en la koro, atendante telefonvokon de supre. Vidu, kiam iu telefonas de supre, la aferoj prezentiĝos malbone. [...] Mi forlasis la kabineton kun fasko da revuoj, kiujn mi ne povis malakcepti. [...] Kiam mi diris al la patrino, ke la papero de ĉi tiuj revuoj eĉ ne taŭgas por viŝi pugon en la necesejo, ŝi kolerigis. Ŝi vidis, ke mi trinkis brandon, kaj ŝi respondis, ke mi devus honti, ĉar mi kuraĝis viziti ebria la malnovan amikon de mia patro. Tiam Sofika aldonis siajn tri groŝojn. [...] kvalito de tiu malglata, landa produkto cetere estas neakceptebla. Ĝi ne taŭgas je viŝado ankaŭ pro la presfarbo, kiu povas malutili al tiu delikata korpoparto.

tradukis *Tomasz Chmielik*

La tempo, kiam mi pentis pro mia verkisteco

Kozeta Zylo. Intervjuo kun verkisto Fatos Kongoli publikigita en ĵurnalo "Illyria" en Nov-Jorko. (esperantigis Bardhyl Selimi).

K.: Vi ricevis de prezidento Sarkozy la plej altan ordenon "Kavaliro de la Honorlegio".

Fatos: Miaj rilatoj kun la franca lingvo, kun la kulturo kaj civilizo franca, ekde mezlernejo, kiam ni lernis la francan kiel duan fremdan lingvon (krom la rusa).

Dum la obskuraj jardekoj de la diktaturo, la franca lingvo, la kulturo kaj civilizo francaj, fariĝis miaj spacoj de forfuĝo, miaj spacoj de libero. Tiam mi konatiĝis kun la granda franca beletro, kaj la mondo, iamaniere fariĝis verkisto, tiu kiu estas mi hodiaŭ.

K.: Vi estas studinta pri matematiko, kio do estis la plej forta incito kaj motivigo via por verki romanojn je tiom alta nivelo artisma?

Fatos: Tiun demandon faris al mi multaj personoj. Fakte mi ekstudis pri matematiko instigate de mia patro. Mi studis parte en Ĉinio (1961-1964), parte en Albanio (1964-1967). Mi okupiĝis pri matematiko dum jardeko, sed mi inklinis al beletro, nomata "beletro de la homa doloro", kiu apenaŭ povintus estiĝi en la tiama Albanio. Kompreninte tion tre malfrue, mi ne povis reveni retroen. Tamen mi ankoraŭ konfesas, ke mi ne tro eraris, kiam mi rezignis je matematiko!

K.: En viaj romanoj oni sentas, ke vi priskribis ankaŭ vian personan mondon, kiel konkretan?

Fatos: Sendube, en ĉiuj miaj libroj enestas elementoj de mia vivo. En la plejparto de ili la rakontado estiĝas en la unua persono kaj oni demandis min, ĉu ne temas pri autobiografiaj romanoj. Ni prenu kiel ekzemplon la romanon La Ebura Drako. La ĉefa persono en ĝi, dum sia junaĝo, same kiel mi, estas studinta en Ĉinio. Krome, tie enestas multaj eventoj, diversaj personoj k.a., entute detaloj, kiujn miaj konatoj konas bone kiel elementojn de mia biografio. Tamen, ne estas tiel. El ĉi tiu vidpunkto mi dirus, ke en kelkaj miaj romanoj ili estas kaj ne estas autobiografiaj elementoj, ĉar la beletro ne povas resti ĉe la fakto, ĉe la “historio”, ĝi iras pluen.

K.: Oni diras, ke verkisto estas filo de Eroso. Kiom da loko okupas erotiko en via prozo?

Fatos: La legintoj de miaj libroj povas konstati klare, ke erotiko okupas sufiĉe multe da spaco en ili. Tio estas natura, erotiko estas ja parto de la vivo. En mia verkado, tio determiniĝas unue pro la imago mia pri beletro. Tion mi jam esprimis pere de la ĉefa persono en la romano “La Hunda haŭto”, i.a. alternativa ego mia. Por li, la beletro estas ino kaj la ino estas beletro. En lia imago, la beletro estas bela ino, post kiu li kuris tutan vivon, tamen ne atinginte kaj ekposedinte ŝin. Vidate per ĉi tiu okulo, erotiko en miaj libroj ne estas celo en si mem. Tio estas en kunteksto pli komplika de la vivo kaj en la konduto de personoj en certaj kondiĉoj. Kurte, mia beletro ne estas erotika beletro, pri kio mi apenaŭ havas ian antaŭjuĝon.

K.: Inter la romanoj kun titolo signifoplena, nin impresis La Hunda Haŭto. Kial vi elektis tiun titolon?

Fatos: Tiu titolo aperis mem, enrudigis kiel esenco de la ĉefa persono, kiu la tutan tempon ironiigas sin. Ekspliko por tiu esprimo estis tiu de iu paŝtisto konata de mi. Laŭ li, iam, en la laktejoj en la montaro, la paŝtistoj “konservis” la buteron en ŝafida felo. Tie la butero konserviĝas, ne difektiĝas, dum en hunda haŭto, la butero apenaŭ povas konserviĝi, ĝi eĉ difektiĝas. El tio venas la esprimo por la virinoj perdiĝintaj ĉe la malvirtaj viroj, kiel ankaŭ la ĉefa persono de la libro por sia edzino, pentinta pro ŝia forpaso. Li sin nomas “hunda haŭto”, kaj tio estas la gvidmotivo de la tuta romano.

K.: Kiom favora estas la beletra klimato en Albanio kaj kiuj estas la baroj?

Fatos: La beletra klimato hodiaŭ en Albanio similas al la beletra klimato en kiu ajn alia libera lando, malfermita, normala, kun kontaktoj kaj nuntempaj evoluoj, en Eŭropo kaj pli vaste. Tio estas esenca por beletro, la libereco kaj la kontaktoj kun la mondo. Tio ne plu mankas al albanaj verkistoj. Mi mem delonge pasigas vivon iom izolatan, pro mia aĝo ankoraŭ pli multe. Laŭ mia scio, aparte la junaj aŭtoroj ne facile povas publikigi siajn verkojn kaj tial oni devas serĉi manierojn, por ke la talentulojn helpu. Sed tio ne tiom facilas, unue pro financaj kialoj.

K.: En Francio oni estas tradukinte kelkajn el viaj verkoj. Kiom influis la pluraj artikoloj en la plej prestiĝaj ĵurnaloj de Francio por pli vasta konatiĝo de vi kiel verkisto?

Fatos: En Francio estas eldonita la plejparto de miaj romanoj, ĝis hodiaŭ 7 el ili kaj la oka, la romano “Bolero en la vilao de maljunuloj” estas jam tradukite. Mi memoras, ke kiam mi publikigis tie mian unuan romanon en la franca, La Perdinto, en la jaro 1997, la eĥo estis vere granda kaj eksterordinara por mi. La ĵurnalo “Le Monde” dediĉis al ĝi longan artikolon, tutan paĝon kaj unu grandan foton mian. Post tiu altapreca artikolo en “Le Monde”, oni tuj proponis al mi eldoni tiun libron en aliaj eldonejoj, en diversaj landoj de Eŭropo. Do, la rolo de la gazetaro estas ne anstataŭebla.

K.: Dum viaj verkaĵoj estas tiom kvalitataj, kiom da tempo dediĉas Kongoli al sia familio?

Fatos: Tiu demando ege embarasigas min. Sciatas, ke verkistoj estas “malfacilaj”, ofte memamemaj, ktp. Mi ne estas escepto kaj povas bedaŭrinde konfesi ke mi ne ĉiam dediĉis la necesan atenton al mia familio. Tial, mi bone scias, ke mi tre malfacile sukcesintus verki tiujn librojn, se ne estintus la bonkomprenemo de mia edzino Lili, kiu oferdonis multon el sia memo, eĉ por la edukado de miaj gefiloj, ankaŭ hodiaŭ por kreo de kondiĉoj optimumaj por labori.